

# ĈEA-Retkomunikoj 2017/03

Estimata leganto,

permesu al mi saluti vin okaze de la Esperanto-Tago! Hodiaŭ venis la ĝusta tempo por nova ĈEA-Retkomunikoj. En tiu ĉi numero ni ŝatus informi vin ĉefe pri la nova tutjara ekspozicio en Esperanto-muzeo en Svitavy. Sed ne nur pri tio! Do, agrablan legadon!



## Plej freŝaj novaĵoj

### **Informoj pri la nova tutjara ekspozicio "La homo kontraŭabelo" en Esperanto-muzeo en Svitavy kaj pri programo de la inaŭguro kaj de la muzea nokto**

[Artikolo en la retejo muzeum.esperanto.cz](http://muzeum.esperanto.cz)

[Fotogalerio kun priskriboj](#)

[Fotoalbumo en la muzea paĝo ĉe Ipernity](#)

[Francisko Valdomiro Lorenz - genio en Ĉeĥio forgesita](#)

Videoregistraĵo de la prelego de Petro Chrdle pri nekredebla vivo kaj verkaro de la plurflanke talentita homo, kiu estis ne nur aŭtoro de la 1-a lernolibro de Esperanto por ĉeĥoj (1890), sed poligloto koninta onidire centon da lingvoj, talenta tradukisto, verkisto, naturkuracisto, spiritisto kaj filantropo .... Laŭdevene ĉeĥo, li travivis plejparton de sia vivo en Brazilo, kie li ankaŭ fondis Esperanto-movadon kaj estas tie ĝis nun multe aprezata. Filmis Pavol Kaščák el Verda Stacio.

La [1-a parto de la koncerto de la muzikgrupo NOPROLEM KOSTELEK NA HANÉ](#)

[\(Senprobleme\)](#) - alterne en la ĉeĥa kaj en Esperanto, kun ambaŭlingvaj komentoj. Filmis kaj prilaboris P. Kaščák. La pluaj partoj de la koncerto baldaŭ sekvos.

[SENPROBLEME - spiritalo Je l' tag' de l' lasta juĝ'](#) (en la ĉeĥa lingvo konata kiel "Soudný den" el la repertuaro de Spirituál Kvintet). Specimeno el la dua KDo en Esperanto de la muzikgrupo NOPROBLEM KOSTELEK NA HANÉ, kiu estis inaŭgurita post la vespera koncerto.

La ekspozicio alireblas tutjare, ĝis septembro 2018, kiam nia muzeo solenos 10 jarojn de sia ekzisto. Malfermohorojn vidu [ĉi-tie](#). Gastoj, kiuj interesiĝas pri komentita trarigardo kaj

renkontiĝo kun lokaj esperantistoj, nepre bv. ĝustatempe anonci vin ĉe la adreso [muzeo@esperanto.cz](mailto:muzeo@esperanto.cz) kaj interkonsenti pri ambaŭflanke konvena dato kaj tempo! La urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, bone trafike atingebla el ĉiuj direktoj (Prago, Brno-Vieno, Ostrava), havas multon interesan por oferti. Ni volonte prizorgos por vi taŭgan tranokton kaj helpos vin organizi vian restadon. Ni antaŭĝojas vian viziton!

## Novaj artikoloj en la Esperanta Retradio

Projekto de Anton Oberndorfer el Aŭstrio, kiu ankaŭ prelegis kaj gvidis seminarion dum la 16-a ĈEA-Kongreso en Pelhřimov, elsendas por vi ĉiutage novan kelkminutan programon pri variaj interesaj temoj. La registraĵoj estas ĉiam akompanataj per teksto por pli facila kompreno. Ĉi-foje ni atentigas vin pri la novaĵoj de la lasta monato kaj pri kontribuaĵoj de la nova kunlaborantino de la radio, ĈEA-membrino Jaroslava Malá. *Legu pli [ĉe nia asocia retejo!](#)*



## Oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio lanĉita!

La 26-an de julio estis lanĉita oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Celo de la paĝaro estas informi vin pri novaĵoj de la esperanta movado en Ĉeĥio kaj en la mondo. [Sekvu nin ĉe Facebook!](#)

## Filmo en la muzea paĝo ĉe Ipernity

[Vizitu Pelhřimov - la urbon de rekordoj](#)

La filmo esperante dublita de V. Türk, publike prezentita dum la 16 ĈEA-Kongreso, post solvo de teknikaj kaj organizaj problemoj povas esti fine prezentita ankaŭ interrete.

## Finlernintoj de Duolingo duoble superas UEA-n

Fine de majo la suma kvanto de la homoj, kiuj eklernis Esperanton ĉe la retejo Duolingo, superis milionon. Proksimume kvin procentoj el la eklernintoj finas la kurson. Tio signifas, ke la kvanto de finlernintoj nun almenaŭ duoble superas la memborkvanton de UEA. *Legu pli [ĉe Libera Folio!](#)*



## Du ĉeĥlingvaj artikoloj omaĝe al la Esperanto-Tago de Esperanto en la retejo Esperanto.cz

[Esperantu je 130 let \(Esperanto iĝis 130-jara\)](#)

[O esperantu v médiích ve 2. čtvrtletí 2017 \(Pri Esperanto en amaskomunikiloj dum la dua jarkvarono de jaro 2017\)](#)

## Eventoj

*Ni elektas el la plej proksimaj eventoj, kiuj okazos en Ĉeĥio:*

### **30/7: 9-a Tosto por Zamĉjo**

Festu la JARON DE ZAMENHOF kaj venu partopreni la aranĝeton TOSTO POR ZAMĈJO. La aranĝo okazos la 30-an de julio en Rakovník. Detaloj pri la aranĝo [ĉi tie](#).

### **11/8-13/8: 20-a renkonto de ekstendaranoj (de Somera Esperanto-Tendaro Lančov)**

Solena renkontiĝo de eksaj tendaranoj kaj amikoj en Lančov. Informojn petu per retroŝto: [info@set-lancov.cz](mailto:info@set-lancov.cz)

### **07/9-10/9: La 46-a Lingva Seminario**

Semajnfina seminario en familieca pensiono ESPERO, kiu troviĝas en pitoreska okcidenta parto de sabloŝtona Bohemia Paradizo (norde de Prago), plena de diverspecaj turismaj allogaĵoj (kulturaj kaj naturaj). Pli da detaloj vi povas trovi [ĉi tie](#).

### **08/9-10/9: Kvakera Kunveno en Prago**

Renkontiĝo de Kvakera Esperanto-Societo okazos ĉe la Kvakera Kunvenejo en Prago inter la 8-a kaj la 10-a de septembro 2017. Temos pri malgranda, sed internacia okazaĵo. Se iu deziras partopreni, tiu povos kontakti Sally Phillips [sallyesp@googlemail.com](mailto:sallyesp@googlemail.com). Pli da detaloj vi povas trovi [ĉi tie](#).

### **22/9-28/9: Internacia Renkontiĝo en Svitavy**

Semajna aranĝo de la Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy, kiu organizos Internacian Renkontiĝon en Svitavy de la 22-a de ĝis la 28-a de septembro. Pli da detaloj vi povas trovi [ĉi tie](#).

### **13/10-15/10: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**

Pinta aranĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun labora traktado, temaj seminarioj kaj programoj ekskursaj, kultura kaj amuza. Informojn sekvu regule [ĉe la asocia retejo](#). Jam [disponeblas aliĝilo en la formato PDF kun pli detalaj informoj](#), elektronika aliĝilo finpretigatas. Eksterlandaj legantoj, bonvolu aliĝi nuntempe per retmesaĝo al [vratislav.hirs@esperanto.cz](mailto:vratislav.hirs@esperanto.cz). Dankon por via kompreno.

Ĉu vi volas aboni ĈEA-Retkomunikojn? Skribu al [retkomunikoj@esperanto.cz](mailto:retkomunikoj@esperanto.cz) !